


# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 7/1986 ★ Kr 8,50



**Jam estas tempo  
aboni gazetojn por 1987**

**Jam estas tempo  
aĉeti librojn por legi  
dum kristnaska libertempo**

## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,  
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet  
måndag-torsdag kl. 17-19.  
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-  
förbundet.

### Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr  
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.  
Pränumerationssavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning  
Kvinpinto. Om du inte får den, med-  
dela födelseår till Esperanto Centro.

## Esperantoförlaget

### Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

### Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept. - 15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras  
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-  
bundet

Adress: EsperantoCentro

Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel  
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga  
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,  
Prästgårdsv. 8, 672 00 Årjäng  
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1986



## SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-  
pero massmedia)  
Västermov. 19, 732 00 Arboga,  
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom  
(kansliet, medlemsfrågor)

Mariehamnsgratan 18  
163 27 Spånga  
Tel 08-751 73 79

Kassör: Börje Andersson (massmedia)  
Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde  
tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha

Andréasson, (SEF-årskongresser)  
PI 2265, 425 00 Hisings Kärra  
tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin  
(turnéer, bibliotek)

Ringv. 11 B, 579 00 Högsby  
tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Rohdin (utred-  
ningar)  
Engelbrektsgr. 25 A, 702 13 Örebro,  
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldo Vedin (utveck-  
ling)

Jordbrogatan 57  
603 64 Norrköping  
tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin (kans-  
liet).

Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,  
tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andreasson  
(utbildning, nordiskt samarbete)  
Södra Rörum, 242 00 Hörby  
tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt  
Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga tel  
0589-155 31

Utgivningsdatum för *La Espero* 1986: ca 31/1, 28/2, 30/3, 30/4, 15/6,  
15/9, 15/10 och 30/11.

Manuskript till tidningen skall vara redaktören tillhanda senast en  
månad före utgivningsdatum. Manuskripten skall vara maskinskriv-  
na med dubbelt radavstånd, helst inga förkortningar. Bokstäverna  
skall vara rätt övertecknade. Manuskripten skall vara av en sådan  
kvalitet att en icke-esperantist direkt skall kunna sätta dem.

Annonspriser i *La Espero*:

1/1-sida	kronor 1 200
1/2-sida	kronor 725
1/4-sida	kronor 425
2 spalter x 6 cm	kronor 250

## Sänkt pris på Nya "Esperanto" årsavgifter nyckeln till det internationella språket för direkta medlemmar 1987

Karl-Erik Ohlsson i Skövde har  
vid arbetet med Esperanto gjort en  
arbetsinsats som gett oss 25 % på  
det överenskomna priset.

Nya priser blir därför  
1 ex 11 kr  
10 ex 75 kr  
100 ex 300 kr

Esperantoförlaget

Direktansluten medlem 100 kr  
Direktansluten familje-  
medlem (utan tidning) 50 kr  
Direktansluten ungdoms-  
medlem 50 kr

Betala in avgiften genast så slipper  
ni belasta minnet med att komma  
ihåg det!

## INNEHÅLL/ENHAVO

- 92 Dags att prenumera  
Bonvenon al Venetio de nordo....
- 93 Agado-Azio-Afriko  
Anmäl dig till jubileumskongr..  
Grupvojaĝo al Varsovio...
- 94 Donacoj  
Kristnask- kaj novjarsalutoj....  
Tra la lando
- 95 SEJU  
La plej unuaj
- 96 Inaŭgura parolado  
71:a UEA-kongreso de H. Tonkin  
Renkontiĝo kun homoj en Ĉinio
- 97 Legu kaj ĝuu "La konscienco riproĉas"
- 98 "Esperanto vivas kaj kreskas konstante"
- 99 Recenzo pri "Streĉeĉ, Steĉĵ-skeĉ'!"  
IAHE  
"Konversacia vortaro"
- 100 "Penio" - mankanta vorto en PIV

## Prezidanto:

La membroj estas la spino en la movado. Sen ilia laboro la evoluo de esperanto ĉesas. Ni ne estas tro multaj kaj pro tio ni devas ĉiuj diligente labori, ĉiuj laŭ siaj kapabloj kaj eblecoj. Ke ĉiuj havas kapablon mi estas certa kaj ni ja havas multajn eblecojn - inter parencoj, laboramikoj, en la amikrondo...

Helpe de la lumbildserio pri esperanto, kiu nun estas preta, vi facile povas oferti prelegojn al societoj kun kiuj vi havas kontakton. Vi povas informi en la klasoj de viaj infanoj. Al pasaĝeroj en trajnoj kaj aŭtobusoj kelkfoje estas eblecoj paroli pri esperanto. Iru al la biblioteko kaj demandu pri esperantaj libroj. Petu ilin havigu se ili ne havas.

Uzu la glumarkojn sur viaj leteroj. Vi certe scias ke SEF nun havas novajn, freŝajn informmaterialojn pri esperanto - broŝurojn, dekalojn, longajn kaj rondajn, afiŝojn en diversaj grandecoj, taŭgajn por kaj la grandaj informatabuloj kaj por laborejaj malgrandaj tabuloj. La nova "ŝlosilo" nun ankaŭ estas preta. Havu ĉiam unu aŭ kelkajn en via poŝto aŭ mansako. Aĉetu



rekte de Esperanto Centro aŭ tra via klubo.

Se ni disdonas tiun informmaterialon certe estos profito por esperanto, sed se ĝi restas sur la bretoj en Esperanto Centro, ĝi nur prenas spacon.

Estas nur kelkaj proponoj, kaj ili ne estas novaj. Vi certe mem povas elpensi pli multajn...

Sed estas grave ke ni estas bone informitaj pri esperanto - kio okazas en la esperantomondo, kiujn progresojn ni havas en diversaj kampoj. Estas multe pli konvinkante se ni havas ĝustajn argumentojn kaj povas doni rektajn respondojn je intrikataj demandoj.

Postulu de via klubestraro, ke ĝi aranĝos almenaŭ unu aŭ du informkunvenojn jare, en kiuj ĝi donos al vi menciitajn informojn, ellernas kiamaniere argumenti... SEF volonte helpos ĝin.

Kvankam mi riskas esti tedema, mi volas tamen ripeti nian celon: **Ĉiuj svedoj scias pri esperanto antaŭ la jubilea jaro!**

Ĉu vi kredas ke ni atingos la celon - ankoraŭ restas kelkaj semajnoj!

Karin Lindquist

# Dags att prenumerera!

Prenumerera på en eller flera esperantotidningar  
— Du får veta vad som händer i  
esperanto-världen och du tränar samtidigt  
språket!

Prenumerationspriset 1987 (\* avser 1986 års priser. Nya priser annonseras snarast för \*-märkta tidskrifter. Sänd beställning och avgifter till Svenska Esperanto Förbundet, Stockholm, postgiro 20 12 - 3.



El popola Ĉinio	90 kr	Literatura Foiro	95 kr
El popola Ĉinio, 2 år	150 kr	Monato	175 kr
El popola Ĉinio, 3 år	210 kr	Monato m kal. utom Europa	250 kr
Fonto	113 kr	Monato med kalender	197 kr
Heroldo de Esperanto	115 kr	Monato utom Europa	225 kr
Hungara Vivo	91 kr	Norvega Esperantisto	50* kr
ICEM Esperanto	60 kr	Oomoto	45* kr
Internacia Komputado	60* kr	Ovo	91 kr
Kancerkliniko + La Krom	85 kr	Paco	66* kr
Kontakto	66 kr	Planlingvistiko	50 kr
Kulturaj Kajeroj	68 kr.	Scienca Revuo	80 kr
La Jaro	22 kr	Simpozio	23 kr
La Mevo	150* kr	UN kaj ni	44 kr
Literatura F./Planlingvistiko	145 kr		

## Bonvenon al Venecio de Nordo, 1987

La jubilea kongreso, la kulmino de la sveda esperantojare 1987, do okazos en la antikva, pitoreska, orientborda urbo Venecio de nordo. La urbo situas grandparte sur insuloj kaj en la Balta maro kaj en la lago Melaro. Por fremdulo povas esti malfacile scii ĉu akvo kiu subite spegulas en la pejzaĝo estas mara aŭ laga. Tamen, la mara akvo havas facile salan gusten. Ĉar certe multaj el niaj karaj kongresanoj jam havis okazon viziti tiun urbon cetera prezentado ne estas necesa. Mi do transiras al la kongreso mem.

**Tempo:** 10-13 de aprilo, ĉirkaŭ la semajnfino antaŭ la pas-

ko. Estas nia espero ke ni kaptos la intereson de la parlamentanoj, kiuj finos sian laboron por paska ferio tuj antaŭ nia inaŭguro ĝuste en la parlamentejo.

Kongresejoj estos la parlamenta domo, la domo de Grill, ĉe Stortorget kaj cetera stokholmaj stratoj kaj placoj. Nur dank' al nia honora membro, Ingémund Bengtsson, ni rajtis lui la parlamentejo, fakto kiu donos speciale altan prestiĝo al la kongreso. Nia estado en la parlamentejo estas ĉiutage limigita, pro kio ni luis festan salonon (la Kavaliran Salonon) en domo de la 17-a jar-

cento ĉe Stortorget. Sed estas nia intenco ke la kongreso estu videbla kaj aŭdebla de la ĝenerala stokholma publiko per i.a. kvar publikaj kunvenoj sur tre frekventitaj lokoj.

Ni esperas ke plej eble multaj kongresanoj restos la lastan tagon, lundon la 13-an, ĉar ĝuste dum tiu antaŭtagmezo okazos la publikaj aranĝoj.

La festena kulmino, la jubilea bankedo, okazos la sabatan vesperon, sed ni revenos pri la kotizoj kaj prezoj de diversaj aranĝoj.

# AGADO — AZIO — AFRIKO

För några år sedan beslöt den dåvarande styrelsen för SEF att delta i denna verksamhet genom att mottaga Cameron Sackey som gäst under högst tre månader.

Nu är tiden inne att verkställa vårt löfte. Cameron Sackey är en 26-årig lärare från Ghana. Han ska här förkovra sig i sitt esperantokunnande, och vår uppgift är att hjälpa honom med detta och se till att han får tala esperanto så mycket som möjligt.

Vi kommer att göra en resplan för honom och ger honom möjlighet att besöka samtliga klubbar men också enskilda medlemmar boende utanför klubborter för att ge även dem möjlighet att få ta emot en så avlägsen gäst.

Förutom det personliga nöjet att få vara värd för honom kan man ju få många tillfällen att med hjälp av honom göra propaganda för språket.

Vi anmodar därför intresserade direktmedlemmar att anmäla sitt intresse för att stå som värdar under ett par dagar.

Skriv eller ring till Kerstin Rohdin, Ringvägen 11 B, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61 och hon kommer att placera in er i resplanen.

Klubbarna får själva ordna fördelningen mellan medlemmarna men bör kontakta Kerstin för besked om tider o s v.

De villkor som gäller för hans vistelse här är att SEF står för alla resekonstnader och för hans fickpengar, medan värdarna står för mat och logi.

## Anmäl Dig till jubileumskongressen i Warszawa 25 juli — 1 augusti 1987

Kongressen kommer att få karaktären av festival. Den blir ett historiskt minne för alla esperantister.

Om du anmäler Dig före årets slut blir kongressavgiften lägre som vanligt.

	Kongressavgifter (i svenska kronor)		
	Till 31/12 1986	Till 14/5 1987	Från 15/5 1987
1. Direkt medlem i UEA .....	490:—	610:—	740:—
2. Icke direkt medlem i UEA .....	610:—	740:—	860:—
3. Kunulo/junulo/handikapulo — direkt medlem i UEA .....	250:—	370:—	490:—
4. Kunulo/junulo/handikapulo — Icke direkt medlem i UEA .....	370:—	490:—	610:—

Beställ anmälningsblankett från Lisbeth Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby, tel. 0415-501 52 (Lisbeth är ny UEA-"peranto" från 1 oktober i år). Blanketten skall sedan tillbaka till samma adress.

All betalning sker till postgirokonto 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Anteckna på talongen vad betalningen avser.

## Grupvojaĝo al Varsovio kaj la kotizoj al UEA

En la venonta numero de La Espero ni informos pri la grupvojaĝo al Varsovio. Estas iom komplikita afero aranĝi tiun vojaĝon, ĉar oni ne scias ĉu estas kongresa vojaĝo aŭ turista, kaj de tio dependas la

prezo.

Ni ankaŭ informos pri la membrokotizoj al UEA. Ni ankoraŭ ne ricevis la novajn por 1987. Atentu ĝis venonta numero enpagi tiujn kotizojn.

## Leteramikoj

kutime ŝatas ricevi bildkartojn. Bildkartojn kun esperanta teksto ili ŝategas. Post la Stokholma kongreso 1980 restas stoko de ok diferencaj urbobildoj "Stockholmo estas mirinda", kiujn ni vendas por 10 kr + afranko 1.70 kr. Mono al ĝiro 2012-3, Esperanto Centro, Stockholmo.



## Donacoj

La donacoj daŭre enfluadas kaj ni korege dankas.

**Klubo Cent Jaroj:**

Maj-Britt kaj Sixten Clausson,  
Arlöv 500 kr

**Klubo Cent:**

Maj-Britt kaj Sixten Clausson,  
Arlöv 200 kr

**Donacoj:**

R. Bernhard 50 kr

Rolf Schoon, Kristianstad 345 kr



## Kristnask - kaj novjarsalutoj per La Espero

Anstataŭ sendi poŝtkartojn al viaj svedaj esperantoamikoj vi povas saluti per anonceto en la decembra numero de La Espero.

En amplekso de 2 cm ĝi kostos 35 Kr. Sendu la monon al poŝtgiro 2012-3 kaj la tekston al Esperanto Centro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm antaŭ 1 decembro.

Ekzemple:  
FELIĈAN NOVJARON  
deziras al ĉiuj esperantistoj Sveda Esperanto Federacio.

## La estraro



## TRA LA LANDO

### Sudorienta regiono

#### Rapport från Småland-Blekinge

Lördagen den 6 september ägde en regionträff rum i Högsby. 25 personer hade samlats för att lyssna till ett föredrag om Sark och tillsammans med föreläsaren Myrtle Green från England diskutera denna intressanta ö. En del relativt nya esperantister deltog också i träffen. På eftermiddagen diskuterade gruppen tillsammans med Harold Brown olika intressanta händelser i den internationella esperantovärlden. Han hade "skummat" olika internationella tidskrifter och avslöjade en del intressanta och nyttiga saker, som ju den vet, som läser esperantopressen från olika länder.

Sist diskuterade gruppen olika sätt att öka förmågan och viljan att prata esperanto framförallt i

fortsättningskurser. Vi gjorde några konkreta försök, t ex presskonferens, sketch, 20 frågor o dyl. Alla även "nyingarna" deltog aktivt.

Några dagar dessförinnan hade Karlskrona ordnat ett offentligt program med Myrtle Green, som berättade om Sark. Lärare och ungdomar deltog. Sam Fritz hade lagt ner mycket arbete på det programmet, skickat många personliga inbjudningsbrev och ordnat samarrangemang med studieförbund. Han kan med tillfredsställelse se på detta internationella esperantoarrangemang i Karlskrona.

Under hela september pryddes biblioteket av en utställning med de nya esperantoaffischerna omväxlande med de färgrika FN-affischerna, som man kan köpa på Esperantocentro för en billig penning. Det var väldigt effektivt att välja ut ungefär samma tema bland FN-affischerna och bland de "nya" affischerna. Med

ringa arbete och kostnad får man en professionell utställning. Sedan lade vi de nya broschyrerna på ett bord framför.

Samtidigt annonserar Vuxenskolan om kurs i esperanto. Speciellt alla som tog emot de polska barnen, som dansade folkdans, är intresserade.

I oktober ska Ferenc Jaki medverka på "Bibliotekets Dag" i Högsby och dessutom göra program i Hultsfred, Kalmar, Växjö, Virserum på biblioteken.

Kerstin Rohdin

### Okcidenta regiono

La laboro komencis por la aŭtuno pli aŭ malpli en la kluboj. Skövde-anoj venis kun sia kluba bulteno kun bona kaj varia programo por la lastaj monatoj de la jaro. Estas ambicia programo kun kaj kursoj diversspecaj kaj preletoj.

Falköping ankaŭ tiu ĉi sezono

povos aŭdi pri esperanto en la lokaj radioelsendoj.

Göteborg komencos la agadon per ekspozicio dum 14 tagoj en septembro en la Informa Centro de la urbo. Oni ankaŭ planas kursojn diversspecajn, kaj kunvenojn por prelegoj, diskutoj, lingvoekzercado ktp.

Kungälv invitis al kursoj kaj ankaŭ planas kunsidojn por diversaj aktivecoj.

La kurso en la Nordia popola Altlernejo fariĝis sukceso kaj nun venis invito al la rektoro, Nils Zandhers, ke kune kun du kunlaborantoj viziti la Internacian Esperanto-kursejon en Pisanica – kaj esperantofestivalon en alia urbo en Bulgario por diskuti daŭrigan kunlabron.

Rilate la projekto interŝanĝi vizitojn Bulgario – Svedio de lernejoj klasoj en Sofio kaj Kungälv ankoraŭ ne estas fiksita la datoj, ankaŭ dependas je la eblecoj havigi monon por la vajaĝo. Sed la planoj daŭrigas.

Märtha Andreasson

## Nordokcidenta regiono

Vid centralskolan i Årjäng har 12 sjundeklassare läst esperanto på timmar för "Fria aktiviteter". De har ägnat ett 30-tal sammankomster på vardera 80 min (= två lektionstimmar) åt det internationella språket. Som studieunderlag har man huvudsakligen använt Ingemar Nordins brevkurs men även andra böcker och tidningar har kommit till användning. Studiegruppen har även öppnat brevkontakter med utländska esperantister. Deras lärare har varit Bo Hedberg som är ordinarie svensk-lärare vid skolan. Han berättar att ungdomarna blivit mycket duktiga och att även under det nyligen påbörjade läsåret kommer en lika stor grupp att stu-

dera språket efter samma linjer.

Klubbverksamhet har inte diskuterats men årjängsklubben håller fortlöpande kontakt med ungdomarna.

Bertil Danielsson

## Norda regiono

Sundsvall:s Esperantoklubb daŭre laboras. La klubo havas 26 membrojn kaj aktivas per kursoj kaj informa laboro.

Umeå Esperantoklubb

La klubo havas 12 membrojn. Ĝi tenis kurson kaj laboris kun ekspozicioj en la ĉefbiblioteko kaj kelkaj filioj.

Vilhelmina Esperantoklubb

havas 7 membrojn. La klubo havas regulajn kunvenojn kaj laboras por disvastigi la lingvon.

Kiruna Esperantoklubb "La Montlagopo"

havas 5 membrojn. Ili provas aktivigi la laboron en la vestonteco.



## Junulara renkontiĝo en Norrköping

La Grifetoj, nova junulara grupo en Norrköping, organizas renkontiĝon 14–16 novembro. Vendrede vespere ĝi komencas kaj sur la programo estos i.a. kurso por komencantoj, promeno en la urbo, sabate vespere surprizo. Kompreneble vi volas iri al Norrköping, do venu al la domo de IOGT-NTO kaj kunportu dormsakon kaj matraceton (litoj ne ekzistas) kaj kompreneble bonan humoron.

La kotizo estas 125 SEK se vi pagos antaŭ la 31 de oktobro. Poste vi devas pagi 150 SEK. La klubo de Norrköping havas Poŝtgiro-numeron 87 503-9 (notu sur la blankedo se vi estas vegetarano).

## Esperanto 100 jaroj (baldaŭ) La plej unuaj

Adresaro de la personoj kiuj el-lernis la lingvon Esperanto, Serio 1, No 1 ĝis 1000, Varsovio 1889, enhavas nomojn de kvar svedoj:

Aug. Nilsson, inĝeniero, redaktoro de "Mekaniske Arbetaren", Gefle.

I Runström, Stureplan N 1, Stockholm.

I H Tegnér, stud, Venersborg.

En la sama kajero sub la rubriko Nomaro de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto kiuj eliris ĝis oktobro 1889:

24. G Henriclundquist, Dokto-

ro Esperanto's Internationellt språk (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda).

27. G Henriclundquist, Vortaro Esperanto-sveda.

El la Enciklopedio de Esperanto: Henriclundquist, Gustaf, svedo, literaturisto. Nask. 1865 en Ystad, mortis 1930 en Paris. Ĉirkaŭ 1890 li migris al Francujo, prenis al si la nomon Sébastien Voriol, vivis tie kiel franca verkisto. Tradukis en 1889 la unuan libron de Z. al sveda lingvo; tiu estis la unua sveda lernolibro de E.

## Inaŭgura Parolado, 71-a Universala Kongreso de Esperanto, Pekino, de Humphrey Tonkin:

# Interkompreniĝo, Paco, Evoluo

Per rezolucio de la 24-a de oktobro 1985, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj solene deklaris la jaron 1986 la Internacia Jaro de la Paco. Ĝi krome atentigis, ke la popoloj devas "vivi kune en paco kaj praktiki toleremon." Estas konate, ĝi aldonis, ke "edukado, informado, scienco kaj kulturo povas kontribui al tiu celo."

Unu monaton pli poste, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion, kiu rekonis la Jubileon de la Internacia Lingvo Esperanto en 1987. Ĝi petis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko sekvi la laboron por Esperanto, ĝi alvokis al utiligo de Esperanto anke de internaciaj organizaĵoj, kaj ĝi rekomendis, ke tutmonde oni enkonduku en la lernejojn studadon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto.

Sekvante la rekomendojn de

Unuiĝintaj Nacioj, kaj konsciante pri la decido de Unesko, Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉi-jaran temon de sia kongreso la temon "Interkompreniĝo, Paco, Evoluo."

Tiu temo tre klare implicas, ke paco estas pli ol manko de milito. Por konstrui la pacon, necesas pozitiva agado – agado, en kiu oni celu krei toleremon inter la homoj, subteni kunlaboron, kaj konstrui la instrumentojn kaj instituciojn de la paco.

La kreinto de Esperanto komprenis tion. Zamenhof skribis, en nia konata himno, pri "nova sento". Ni ofte kantas tiujn vortojn, sed ĉu ni vere komprenas la signifon de tiu nova sento? Zamenhof kreis per Esperanto miraklan internacian lingvon, kiu brile funkcias – kiel ni klare vidas ĉi tie, kie ĉino kompreniĝas kun germano,

brazilano kun japano, kanadano kun iranano. Temas pri kompreniĝo, kiu jam preskaŭ cent jarojn mirigas la utiligantojn de nia facila, fleksebla, esprimiva lingvo.

Sed per la vortoj "nova sento" Zamenhof celis lingvon ne nur de la lango sed ankaŭ de la koro, ne nur de la korpo sed ankaŭ de la animo. La arkitektoj de la tutmonda paco, ĉu esperantistaj ĉu neesperantistaj, insistas, ke necesas ŝanĝi la pensmanieron de la homoj por krei veran pacon. Tion ni parolantoj de Esperanto komprenas. Ni jam praktikas tiun "Novan senton" – sento, kiu kapablas forigi la miljarajn murojn inter la popoloj.

Pro tio, en nia kongresa temo, ni aldonis al "paco" ankaŭ la vorton "interkompreniĝo." Fakte, ni metis interkompreniĝon en unuan lokon, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de la vera paco.

## Renkontiĝo kun homoj en Ĉinio

Esperanto havas potencon en Ĉinio

Inter la 2300 partoprenantoj en la 71-a universala kongreso en Pekino 1986 estis 350 ĉinoj. Ili havis permeson de siaj laborlokoj kunesti.

Post la kongreso mi rondveturis en la lando dum du semajnoj. Mi estis en unu esperanto grupo "Paderborn". Ni renkontiĝis kun multaj esperantistoj loka. Ili neniam antaŭe havis eblecon interparoli kun eksterlandanoj. Ili salutis nin kun kantoj kaj donacoj. La renkontiĝoj estis tre amikecaj.

La ĉinoj lernas esperanton en

kursoj kaj ankaŭ en universitato. Ili bezonas leteramikojn en Svedio kaj aliaj landoj por progresi.

**Granda lando**

Ĉinio estas kontinento, surface same granda kiel Eŭropo aŭ Usono. En la lando loĝas 1000 milionoj da homoj, 800 en la kamparo kaj 200 en la urboj. La popola strukturo de la tria mondo, al kiu apartenas Ĉinio, estas multaj junuloj kaj relative malmultaj maljunuloj. La homoj estas ĝentilaj kaj laboremaj.

Kiom da homoj mi vidis dum tri semajnoj en Ĉinio? Multaj, multaj.

**Bicikloj**

Ĉiuj biciklas. Ekzemple en Pekino kun 11 milionoj loĝantoj estas ankaŭ 5 milionoj bicikloj. La biciklistoj krosas kun granda sperto kaj uzas sonorilon tiel ofte kaj laŭte ke la komuna sono preskaŭ dronas la kantojn de la ĉikadoj. La vojoj por ciklistoj estas larĝaj kaj la stratoj longaj, longaj.

En Ĉinio ne estas privataj aŭtomobiloj sed aŭtoj de firmoj, taksioj kaj busoj. Ĉie estas pure. Nenia papero estas forjetata sur la strato. Oni ne permesas



hundojn kaj katojn en la urboj, ne estas loko por ili.

#### Familia vivo

Tradicie la generacioj loĝas kune. La maljunuloj prizorgas la infanojn dum tagoj kaj kuiras. La gepatroj laboras sur kampoj, en fabrikoj k.t.p. En tia maniero ĉiam estis.

Kiel kutime en varmaj landoj la vivo vespere pasas ekster la domoj. Oni vidas same multajn da viroj kiel virinoj kune kun infanoj.

La infanoj estas gravaj por la familio el la sociala kaj ekonomia vidpunktoj. La infanoj poste prizorgos la maljunulojn. En la kamparo oni ankoraŭ multe laboras mane kaj por tio necesas labormanoj.

Samtempe la kreskado de la popolo estas la plej grava problemo de la lando. Nun oni havas la "unuinfana sistemo" en la tuta lando. Unu ekcepto estas, se la unua

infano en kamparo estas knabino, la familio rajtas havi ankoraŭ la duan infanon. Pli da infanoj en la familio estas risko, eble la infanoj havos malfacilaĵojn esti akceptitaj en lernejoj kaj en malsanulejoj.

#### Labora vivo

Salajroj estas malaltaj. Laboristoj de specialaj fakoj povas gajni monate 300 kronojn (150 ĉinajn juanojn) plus premion. Sciencistoj, kuracistoj, instruistoj gajnas 250 kronojn dum monato. Laboristoj kiu purigas stratojn (ĉiam virinoj) gajnas nur 150 kronojn monate. La plej bonan ŝancon gajni monon havas kamparanoj ek de 1979 (vidu malsupren).

Gejunuloj rajtas studi ĝis la aĝo de 25 jaroj. Oni ankaŭ povas studi per helpo de televido (la malfermita universitato). Se juna persono ne tuj post la fino de lernado trovas laboron, li aŭ ŝi estas rekomendata provi esti memstara, ekzemple kiel biciklo-riparisto. Asekuro kontraŭ man-

ko de laboro ne ekzistas en Ĉinio.

En fabrikoj oni laboras tage ok horojn dum ses tagoj en la semajno. Ili ferias nur unu semajnon en la jaro. Kiel pensiuloj ili ricevas malgrandan pension. La kamparanoj ne ricevas pension.

#### En la kamparo

Ni renkontiĝis kun kamparanoj en tri diversaj provincoj.

Ĝis 1979 la kamparanoj havis fiksitajn salajron sed ne plu. Nun ekzistas "respondeca sistemo". La kamparanoj luas la teron de la ŝtato kaj vendas fiksitajn kvanton de produktoj al la ŝtato. La pluson de la produktado ili vendas sur la libera merkato en proksimaj vilaĝoj kaj urboj.

Ĉinio ne bezonas importi manĝon, la produktado en la lando sufiĉas. La kamparanoj rikoltas rizon, teon, legomojn, fruktojn k.t.p. Ili havas porkojn, kokinojn, akvobufelojn. La kamparanoj nutras sin bone sed multe laboras.

Kerstin Kristoferson

**Bertil Andreasson:**

## Legu kaj ĝuu "La konscienco riproĉas"

Antaŭ nelonge mi legis la libron La konscienco riproĉas de August Strindberg. La brila esperanta traduko faris G.H. Backman, unu el la svedaj pioniroj. Kiel vi scias Strindberg apartenis al la naturalistoj, kiuj tre detale priskribis la realecon. En la libro mi trovis parton, kiu estas ege majstre verkita kaj ege majstre tradukita. Legu kaj ĝuu:

"Li estis ŝovinta la okulvitrojn sur la vereton, kaj, ne movante la plumon, li elrigardis tra la fenestro. Jen kuŝis la ĝardeno en tuta sia aŭtuna belegeco kun pomkaj pirarboj kliniĝantaj teren pro la plej belaj fruktoj. Oranĝoruĝaj

kukurboj sunbanis sin apud dor-naj, grizverdaj artiŝokoj, fajroruĝaj tomatoj rampis laŭ-longe de bastonoj tuj apud kapoj de flor-brasiko, blankaj kiel kotono; sunfloroj, tiel grandaj kiel teleroj, turnis siajn flavajn diskojn okcidenten, kie la suno komencis subiri; tutaj arbetaroj el dalioj, blankaj kiel novgladita tolaĵo, purpuraj kiel rigidiginta sango, kotruĝaj kiel ĵus buĉita viando, salmoruĝaj kiel tio, kion oni nomas tripaĵo, sulfurflavaj, linkoloraj, makularaj, kantadis unu plenan kolorkoncerton. Kaj plue la sablita vojeto, gardata de tiuj grandegulaj levkoj, pale siring-

okoloraj, blindige glaciĉbluaj, pajloflavaj, kiuj elteris la perspektivon ĝis tie, kie kuŝas brunverdaj la vinberkampoj, arbetaro el tirsos kun la ruĝiĝantaj vinberaroj duone kaŝitaj sub la foliaro. Kaj jen poste: la blankiĝanta, nerikoltita pajlo de la grenkampoj kun la superplenaj spikoj malgaje kliniĝantaj teren, kun grenventumaĵo kaj ŝirmfolietoj disigitaj, je ĉiu ekblovo redonate al la tero ĝian pruntaĵon, ŝveligitaj de suktoj, same kiel la mamoj de la



patrino kiam ŝi okaze ne suĉigas sian infanon. Kaj plej malproksime en la fundo la mallumaj kverkokronoj kaj fagarkajoj de la arbaro de Fontainebleau, kies konturoj solviĝis en la plej delikatajn siluetojn simile al antikvaj pontoj Brabantaj, tra kies maŝoj la horizontala radiaro de la vespersuno

enjetis fadenojn el oro. Ankorau kelkaj abeloj vizitis la belegan mielkaŝejojn ekstere en la ĝardeno: ruĝgorĝo eksonigis kelkajn simplajn trilojn en la pomarbo; sed fortaj odoroj de tempo al tempo eliĝis el la levkojoj, same kiel okazas, kiam oni iradas sur trotuaro, kaj la pordo de par-

fumejo ekmalfermiĝas”.

Legu mem plu! La libro estas havebla ĉe Esperanto-Centro kaj kostas nur 6 kr.

Por ke ankaŭ la komencantoj profitu la rakonton supren, ni tradukis kelkajn nekutimajn vortojn:

verto	hjässa	tripaĵo	ränta	fago	bok
kukurbo	pumpa	sulfuro	svavel	maŝo	maska
dorno	tagg	sablo	sand	mielo	honung
artiŝoko	kronärtskocka	levkojo	lövkoja	kaŝi	gömma
rampi	klättra	siringo	syrén	gorĝo	hals, svalg
gladi	styrka	tirso	klase		
koto	smuts	kverko	ek		
buĉi	slakta	suĉigi	amma		

**Bertil Andreasson:**

## ”Esperanto vivas kaj kreskas konstante”

En malnovlibrejo mi trovis malgrandan esperantan libron. Estas vortlisto eldonita de O.W. Hjärtstätt, Kristinehamn en propra eldonejo 1908. En la antaŭparolo li skribas ke la libro ĉefe estas propaganda vortlisto kaj ne kostas multe. La celo estas ke esperantistoj aĉetu la libron en pluraj ekzempleroj kaj disdonu ĝin al interesuloj. Do, iu speco de antaŭulo de la ŝlosilo. La libro en si mem estas interesa, sed pli interesa estas malgranda paperslipo, kiun mi trovis en la libro. Estas esperantlingva eltondaĵo de iu gazeto kaj certe de la jaroj ĉirkaŭ 1908-1910 ĉar la teksto kredeble koncernas la tiaman IDO-krizon. Estas kuraĝiga teksto por tiuj kiuj estas fidindaj al la

esperanta idealo. Mi donas al vi la tekston:

”Esperantistoj! Esperanto vivas kaj kreskas konstante. Samtempe ankaŭ kreskas pli kaj pli fortaj potencoj kiuj deziras detruiri la kreskon. Tiuj potencoj delogis kelkajn el nia vicoj. Nun estas sekve la devo de la veraj esperantistoj unuigi siajn fortojn por konservi la pozicion jam gajnitan de la Esperantismo en nia lando kaj

por konstrui plu sur la metita fundamento. La reformemuloj amuzu sin en paco kun siaj eksperimentoj; iliaj faroj koncernas nin tre malmulte. Ni devas esti energie fidelaj, ni devas resti prudente lojalaj. Ni devas ne dormi, ne rigardadi silente, sed AGI! Unue ni interkonsilu pri la agadmanieroj! Skribu al Por Esperanto, Stockholm”.

### Ŝanĝiĝas la tempoj.

- Sinjorino, en la pasporto estas indikite, ke vi havas nigran hararon, sed via hararo ja estas blonda.
- Ho jes, sed la pasporto estas de la pasinta jaro.

## Recenzo pri

# "Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!"

Aperis nova libro de **Stefan MacGill**: *Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!* La novzelanda skeĉisto, kiu nun loĝas en Hungario, verkis novan surpaperigon de novverkitaj kaj "klasikaj" skeĉoj.


La temoj gamas inter fonetika interpunkcio kaj monda politiko, sed la libro postulas multon de la leganto, konojn kaj pri la lingvo kaj pri la movado, almenaŭ por plena apreco.

Bedaŭrinde kelkaj el la skeĉoj

perdas pli-malpli grandan parton de sia viveco kiam ili aperas libroforme, sed ĉi-tiu prezentmaniero tamen ebligas alitipajn ŝercojn, ekzemple bildajn kaj vortaspektajn. Cetere, la ilustraĵojn faris la aŭtoro mem kaj ili ofte estas tre amuzaj. La libro estas leginda, sed prefere vidu la aŭtoron mem skeĉantan.

La skeĉaron eldonis stafeto, aprilo 1986.

Erica Nilsson kaj Joakim Enwall



## IAHE

IAHE – La Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj estas eĥo de la bezonoj de invalidaj esperantistoj, kiel ili kun siaj fortoj kaj kapabloj, kune kun aliaj, aktive partoprenas en la solvado de siaj pluroblaj problemoj kaj problemoj de la monda komunikado

pere de internacia Lingvo – Esperanto.

Aliĝilojn atendas kaj helpon akceptas:

**Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj**, Skolska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

## "Konversacia vortaro"

Kiam mi kaj mia edzo vizitis gesinjorojn Pettersson en Norrköping (Calle P. estas ano de la informa komitato de SEF) mi trovis en ilia librobreto libron **Konversacia vortaro** verkita de gelerantoj en la kursoj de Andreo Ĉe. Estas tre amuza legado kaj mi publikigas kelkajn vortojn.

La redaktoro.

**Amas** = la plej bela, grava kaj interesa vorto. La unua vorto, kiun ĉiu homo serĉas en la vortaro.

**Bela** = la plej grava kvalito, la spegulo diras ĝin al la sinjorino.

**Cerbo** = Griza, mola objekto en la kapo, tre grava dum la vivo.

**Ĉambro** = skatolo de la homoj

**Diskuto** = homoj parolas pri objekto, kiun ili ne konas

**Edzo** = malfeliĉa viro, kiu havas ringon

**Facila** = kvalito de esperanto

**Gramatiko** = moderna labirinto, el kiu la homoj ne povas eliri (esperanto ne havas ĝin).

**Ĝisrevidohoro** = la nomo de tiu horo, je kiu la konversacio finiĝas

**Hejmo** = dolĉa loko, kie la homoj estas dum la nokto

**Instruas** = metas objektojn en la kapojn de la homoj

**Juna** = kvalito de tiu homo, kies koro estas varma

**Koro** = malgranda domo kun kvar ĉambroj en la homo

**Ludas** = la infano laboras.

**Muziko** = bildo, kiun oni vidas per la oreloj

**Nubo** = la griza vesto de la ĉielo

**Okuloj** = la fenestroj sur la kapo

**Paco** = la popoloj estas amikoj

**Redaktoro** = homo, kiu kritikis la tutan mondon

**Salutas** = faras etiketan gimnastikon

**Ŝlosilo** = la plaj malgranda gramatiko en la mondo

**Tondras** = la ĉielo parolas

**Universo** = ĉio, kio estas

**Vejno** = sangrivero en la korpo

# "Penio" — mankanta vorto en PIV

Bernard Golden

**Kvankam Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas la plej ampleksa nun ekzistanta Esperanto-vortaro, ĝi vere ne estas plenplena, t.e. kompleta. En ĝi ne estas registrita la tuta aktuale uzata leksiko de Esperanto. Mi ne pensas pri mortnaskitaj vortoj, nomataj ankaŭ okazaj esprimoj, uzitaj de nur unu aŭtoro, unu fojon. Ekzemploj de okazaj esprimoj de la fruaj jaroj de Esperanto estas "friŝtiko", kiun Zamenhof enkondukis en sian tradukon de La Revizoro kun la signifo "matenmanĝo", la vorto "mensuro", signifanta studentan duelon, kiu aperis en artikolo de Meier en La Esperantisto, kaj la enigma "borto" en rakonto tradukita de Edgar von Wahl, kies signifo nuntempe ne estas konstata. Aliaj esperantistoj ne alprenis tiujn vortojn, do ili neeviteble sekvis siajn enkondukiĝojn en la tombon. Grava demando por leksikografoj en Esperantujo estas, ĉu tiaj vortoj nepre estu registritaj pro historiaj kialoj, aŭ ĉu oni evitu la tendencon ŝveligi la enhavon de vortaroj per nevivanta leksika materialo?**

Kontraŭe, ekzistas pluraj aliaj vortoj, aperantaj pli-malpli ofte en verkoj en Esperanto, kiuj mankas en PIV. Unu el ili estas la verbo "drafi" (esti libera fari ion, havi permeson fari ion). Dum ses jardekoj ĝi estis uzata de diversaj aŭtoroj, sed ĝi daŭre restis antaŭ vortaraj pordoj pro tabuo de leksikografoj. Ankaŭ la verbo "domini" estis maljuste diskriminaciita. Plena Vortaro (PV) en la Suplemento de 1954 registras ĝin kun la signifo "superregi, superi". Dek ses jarojn poste, pro iu nekomprenebla kialo, ĝi estis preteratentita en la pligrandigita PIV (1970). Tamen, "domini" ofte

aperas nuntempe en publikigitaj tekstoj verkitaj de bonaj esperantistoj. Ankoraŭ unu vorto, kiu kvazaŭ pario ne estis akceptita de la redakcio de PIV, estas "penio". Ĝi malestas ankaŭ en la Neologisma Glosaro (1983) de Henri Vatré, kiu enhavas multajn aliajn vortojn, karakterizeblajn kiel verajn leksikajn forbalaĵojn. Ni esploru la historion de "penio" en Esperanto.

PIV difinas "marko" jene: 1. malnova franca unuo de pezo; 2. monunuo de Germanujo kaj Finnlando. Sekvas resendo al "pfenigo", kiu estas centono de la germana marko. Mankas resendo al vorto signifanta centonon de la finna marko. Ne nur PIV ne donas tiun informon. Ankaŭ etnolingvaj Esperanto-vortaroj — kun unu escepto — silentas pri la financa situacio en Finnlando. En finna Esperantovortaro kompilita de Joel Vilkki, Suomi-Esperanto-Suomi (1963), la finna vorto penni estas tradukita per "groŝo" kaj "penio". Aliaj Esperantaj konsultlibroj, en kiu "penio" estas trovebla, estas (1) La Jaro 1982 — praktika poŝkalendario de Monato, kiu informas, ke "1 marko = 100 penioj" kaj (2) Poŝatlaso de la Mondo (1971), en kiu oni povas legi en la artikolo pri Finn-

lando "Mono: finna marko = 100 penioj". Pli fruaj publikigaĵoj kun la sama sciigo estas la Kongresa Libro 1969 de la Universala Kongreso en Helsinko ("la finna mono estas la marko, kiu dividiĝas en 100 penioj") kaj la ilustrita fakt-hava broŝuro Rigardu Finnlandon (1968), inter kies utilaj sciigoj estas jena: "la finna marko dividiĝas en 100 peniojn."

Plua spurado indikas, ke la vortara registrado de Joel Vilkki en 1963 ne estas la plej frua. Jam en 1934 penni havis kiel Esperantan ekvivalenton la vorton "penio" en Svensk-Esperantisk ordbok, kompilita de Jansson, Lindén kaj Gerdman. Ĉu "penio" estis enkondukita en Esperanton kiel neologismo ĝuste en tiu jaro, aŭ ĉu tio okazis pli frue? Povas esti, ke zorga trakribado de finnaj Esperanto-vortaroj kaj periodaĵoj ebligis malkovron de la dato de ekuzo de "penio".

Ĉiokaze restas la demando, kial PIV informas, ke oero estas centono de la skandinavia krono, la bulgara levo dividiĝas en cent stotinkojn kaj 100 senoj egalvaloras unu japanan enon, sed ne registras la nomon de la finna monero "penio", kvankam ĝi ja estis uzata en Esperanto almenaŭ tridek ses jarojn antaŭ publikigo de la vortaro.

**Kristnask -  
kaj novjarsalutoj  
per La Espero**

LIMDATO POR LA  
TEKSTO ESTAS  
1 NOVEMBRO

